

Kataluna Esperantista



NUMERO 335 (101)
KVINA EPOKO
JULIO-SEPTEMBRO 2005

Amasa IJK

Septembraĵ aranĝoj

Nova flugfolio

KEJ plenvelas

Trioje en Indymedia

Intervjuo al aktivuloj

En defenza del francès

*El multilingüisme
de la dreta*

El fugitiu

L'esperanto, una llengua artificial?

L'esperanto és, certament, la llengua artificial per antonomàsia. El terme artificial, aplicat a una llengua, desperta, però, passions: en un món en què estem envoltats d'objectes ben poc naturals, i encara més en una espècie que, com la nostra, es caracteritza per la creació d'eines –artificials–, no semblaria que aquest adjectiu pogués fer arrufar el nas a ningú. Però, aplicat a una llengua, essent la parla un altre element substancial dels humans, sembla que sigui així, fins i tot en el temps en què l'anomenada enginyeria lingüística es fa més i més present en la nostra vida amb diccionaris electrònics, correctors ortogràfics i gramaticals o traductors automàtics. Analitzem, però, el grau d'artificialitat de l'esperanto i, potser, ens emportarem alguna sorpresa.

Analitzem el grau d'artificialitat de l'esperanto i, potser, ens emportarem alguna sorpresa.

Pensem primer en la llengua, un concepte que, tot i que l'utilitzem cada dia, no deixa de ser una extrapolació. L'únic fet palpable i real és la parla de cadascú, individual i diferenciada: no hi ha dues persones que parlin exactament de la mateixa manera, ni tan sols si es tracta de germans. És clar que les petites diferències existents no solen impedir la comunicació amb els veïns,

i del conjunt de parles individuals intercomprensibles se n'indueixen entitats genèriques com llengües o dialectes. Aquestes generalitzacions no deixen de tenir un punt d'arbitrarietat, com veiem en els continus lingüístics, com el de la Romània, on des de Galícia fins a Valònia o Calàbria tothom es podia entendre amb els veïns, de manera que les fronteres lingüístiques eren poroses, difuses, artificials.

Segueix a la pàgina 16 ➤





**La kataluna
esperanto-movado
okulfrape kreskas,
fariĝas pli diversa
kaj pozitive evoluas**

Pli antaŭen!

Delonge la kataluna esperanto-movado komprenis, ke esencas agadi ekster esperanto-framoj, por fariĝi iom rimarkata. La vojo estis klara jam en la 90aj jaroj, kiam aperis la revuo *Frequències* en la kataluna (1990-1993), aŭ dum la kataluna kongreso de Mataró en 1995, kun la partopreno de Jordi Petit kaj Juan de Dios Ramírez Heredia, aŭ dum la konferenco pri “La lingva problemo en Eŭropa Unio” de 1999 kun reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj parlamente reprezentitaj politikaj partioj kaj de renomaj lingvistoj kiel Xavier Lamuela, Miquel Siguan, Jordi Solé kaj Lluís de Yzaguirre.

En la du lastaj jaroj plimultiĝis la partopreno en surstrataj foiroj kaj aranĝoj, pluraj informiloj estis eldonitaj, *Kataluna Esperantisto* parte ekaperis en la kataluna, estis eldonita kaj distribuita tra bibliotekoj la dulingva libro “Els inicis del moviment esperantista a Catalunya – La komenca esperanto-movado en Katalunio”, kaj ni multe aperis en la amaskomunikiloj.

Tamen mankas longedaŭra, regula interrilatado kun aliaj movadoj: de jaroj KEA fruktedone membras en la Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj, sed mankas fortoj por aliĝi kaj tenadi rilatojn kun la Federacio de NRO pri Homaj Rajtoj. Same, ni tre konscias, ke necesas partopreni ne nur en Indymedia Barcelono, sed ankaŭ en la du grandaj novaĵ-retejoj de la kataluna asociaro, entitats.info kaj canalsolidari.org, sed ankaŭ por tio fortoj ankoraŭ ne sufiĉas.

La kataluna esperanto-movado okulfrape kreskas, fariĝas pli diversa kaj pozitive evoluas. Ideoj ne mankas kaj la direkto ŝajnas klara. Necesas bone plani la paŝojn, por kiel eble plej trafe plu kreski.

Hektor Alos i Font

En ĉi tiu numero kunlaboris: Carles Verdugo, Christian Pinard, CNT Maresme, Darío Rodríguez, Ferriol Macip, Francesc Poblet, Gerard Escuer, Josep Enric Peres, Guillem Sevilla, István Ertl, Joan Català, Joan Inglada, Joan Ramon Guiñón, Jorge Camacho, Llibert Puig, Lluís Batlle, Manuel de Seabra, Pau Climent, Ramon Perera, Roger Prieto, Xavier Margais.

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2005: Individua Abonanta Membro 36 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 72 eŭroj; Individua Dumviva Membro 720 eŭroj; Kolektiva Membro 72 eŭroj; Juna Membro 24 eŭroj.
Banko: Caixa d’Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053
Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Òscar Puig; komitatanoj: Arnau Massanes, Llibert Puig, Mateu Vic, Neus Moly, Ramon Perera.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Sylvie Roques.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Estraro: Prezidanto: Lluís Batlle; vicprezidanto: Pau Climent; sekretario: Joan Català; kasisto: Roger Prieto.

Impres a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Katalunoj en IJK

Dudek katalunoj partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Pollando. Tia kvanto ne estis atingita de deko da jaroj, same kiel la ĉi-jara IJK, kun ĉ. 500 aliĝintoj, rezultis la plej amasa de post 1988. Alia rimarkinda aspekto estis la diverseco de la devenoj, pro kiu katalunoj fariĝis la kvina grupo en la kongreso laŭ aliĝoj, malantaŭ rusoj, francoj, poloj kaj germanoj.

KEJ-anoj denove partoprenis la komitat-kunsidojn de TEJO per sia nova A-komitato Joan Català, el Benicàssim. Tre vigla fariĝis ankaŭ la prezento de la kataluna, kune kun la okcitana, en la lingva festivalo okazinta dum la kongreso.

Nun, partoprenintoj ekplanas, kiel ne maltrafi la venontan IJK en la allogega Sarajevo.



Komuna fotiĝo en IJK

Barakoj en Sabadell

De la 2a ĝis la 4a de septembro, kadre de la urbofesto de Sabadell, okazis la tradiciiĝantaj junularaj barakoj, kie ĉiunokte ĝis la sesa matene, oni aranĝis koncertojn kaj estis la plej malfrua renkontiĝejo de gejunuloj. 25 barakojn prizorgis 25 asocioj, inter ili KEJ.

Laŭlonge de tri sinsekvaj noktoj dudeko da homoj preparis la budon kaj deĵoradis en ĝi, vendante bieron kaj ĉiajn aliajn trinkaĵojn. Danke al kunlaboro kun aktivuloj de RAWA, la Revolucia Asocio de la Afganaj Virinoj, la budo proponis ankaŭ tieajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kiuj plihomigis la celitan internaciecon per larĝa sortimento de multlandaj ebriigaĵoj.

Kvankam oni disdonis flugfoliojn kaj vendis stel-pinglojn kaj iom da esperantomuziko, la ĉefa celo de la budo estis, ke esperantistoj aperu tut-normale apud multaj aliaj asocioj en junulara medio. La celon ni plenumis, sed la celo nin konsumis, ĉar, pro manko de sperto, la aranĝo montriĝis deficitata, kiam oni certis pri relative granda profito. Tamen ekzistas la deziro denove ripeti la sperton en la venonta jaro, ĉu en Sabadell, ĉu aliuurbe.



Rahman kaj Xavi deĵoras en la KEJ-barako

Asoci-foiro en Barcelono

La 11an de septembro, KEA havis budon en la Asoci-Foiro apud la Triumfa Arko en Barcelono. Temas pri la kvara sinsekva jaro, en kiu la asocio Gent de la Terra organizas tian aranĝon, kaj la dua, en kiu KEA partoprenas.



Dum la tuta tago miloj da homoj pasis antaŭ la budoj, i.a. danke al la proksimeco de la monumento al Rafael Casanoves kaj la Citadel-Parko, kie okazas la plimulto de la ĉefurbaj aranĝoj dum la nacia tago.

La budoskipo, renoviĝanta laŭlonge de la tuta tago, distribuis kelkcenton da flugfolioj kaj inform-materialo.

Kongreseto en Barcelono

De vendredo 16a ĝis dimanĉo la 18a de septembro okazis la t.n. Esperanto-Tagoj de Barcelono. La tria renkontiĝo de KEA de la jaro denove fariĝis 80-homa kongreseto danke al la impeto de KEJ.

La Esperanto-Tagoj sekvis la strukturon de la marta renkontiĝo en Mataró: ili estis senpagaj kaj malfermitaj al la publiko. Sabato, kiam disvolviĝis la kerno de la programo, okazis tri samtempaj aranĝoj planitaj por tri malsamaj lingvoniveloj: plenaj komencantoj, progresantoj kaj fluaj parolantoj. Partoprenis homoj ĉiuaĝaj, de 17 ĝis 71 jaroj; el preskaŭ la tuta Kataluna Landaro kaj eksterlandanoj el sep malsamaj naciecoj; delongaj esperantistoj, memlernantoj por la unua fojo aŭdintaj esperanton, mezlernejanoj verkantaj klaslaboraĵojn pri esperanto kaj scivolemuloj.

La aranĝo pruvis, ke la marta sukceso en Mataró ne estis miraĝo, sed ke okulfrapa kresko havas solidan grundon post plurjara laboro. Novaj homoj serioze ekativas: dum la aranĝo okazis ne nur dudeko da kursoj, prelegoj kaj diskutoj kaj du ekskursoj, sed estis tempo ankaŭ por renkontiĝo de liberecanoj, kunveno de valenciaj aktivuloj, ateliero por novaj Indymedia-tradukantoj

kaj asembleo de KEJ, kie nova estraro estis elektita.

El gazetara vidpunkto, la renkontiĝo ne montriĝis sukcesa, kvankam aperis informo pri ĝi en la kvartala gazeto *La campana de Gràcia* kaj Ferriol Macip estis intervjuita dum kvaronhoro en Ràdio Gràcia.

fmb / red

Nova flugfolio

Okaze de la septembra aranĝ-maratono, KEA eldonis novan flugfolion, kiuj aldoniĝas al la du aperintaj aprile por la librotago. Per klaraj strekoj, uzante metaforon de granda fiŝo glutanta la malgrandajn, la informilo, dezajnita de Guillem Sevilla, reklamas la taŭgecon de esperanto kiel rimedo kontraŭ lingvopereado. La flugfolio estis eldonita en du malsamaj formatoj, kiel du-flanka A5-flugfolio kaj kiel kvarpaĝa A6-kajereto, kaj distribuita ĉefe en la barakoj de Sabadell kaj la asoci-foiro de Barcelono.

La festo de Gràcia en esperanto


Kiel en pasintaj jaroj, en la TTT-ejo de la ĉeffesto de Gràcia, www.festamajordegracia.org, eblas legi mallongan priskribon en esperanto de tiu milion-homa aranĝo, kiu etendas sin tra tuta semajno. La tradukon faris jam antaŭ kelkaj jaroj Ferriol Macip, kaj la TTT-fakuloj mem ĝisdatigas ĝin ĉiujare.

Dum la ĉi-jara festo, akompanante ĉuvaŝajn esperantistojn, renkontiĝis deko da lokaj junuloj, kiuj, krom amuziĝis, ankaŭ disdonis flugfoliojn.

Kurs-fina vespermanĝo

La pasintan 1an de julio okazis la kursfina vespermanĝo en la sidejo de Centro de Esperanto Sabadell kun partopreno de 24 gesamideanoj ĉefe el Sabadell, sed ankaŭ el Castellar, Terrassa, Barcelono kaj Ripollet. Kun tre refreŝiga menuo kaj bonega etoso la rendevuo disvolviĝis tre kontentige kaj amike.

ces



Asociació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio
<http://www.esperanto-ct.org>



Jovenut Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Junularo
<http://www.esperanto-ct.org/kej>

KEJ asembleas

KEJ kvazaŭ refondiĝas dum la kuranta jaro. La marta kunveno en Mataró montriĝis turnpunkto danke al la engaĝiĝo de novaj homoj. En la asembleo okazinta dum la septembra renkontiĝo en Barcelono, nova estraro estis elektita, kun Lluís Batlle (Garrotxa), prezidanto, Joan Català (Plana Alta), sekretario, kaj Roger Prieto (Barcelonès), kiu restas en sia kasista posteno. Agas kiel vicprezidanto Pau Climent (Marina Baixa), mem prezidanto de la nov-fondita València Esperanto-Junularo, en kiu ankaŭ Joan Català sekretarias kaj Vicent Gimeno postenas kasiste. Joan Català estas ankaŭ la komitatano de KEJ en TEJO.

La asembleo informiĝis pri la stato de la asocio, kaj pritraktis, kiel plej trafe diskoniĝi la lingvon per novaj esperanto-varoj.

Nova TTT-ejo de KEJ

Estas kreita la TTT-ejo de KEJ ĉe www.esperanto-ct.org/kej. Ĝin programis Joan Català kaj dezajnis Guillem Sevilla. La enhavojn prizorgis ĉefe ambaŭ. Temas pri ege alloga plenfunkcia TTT-ejo memstara, kvankam aperanta kiel sub-adreso de la retpaĝaro de KEA. Ĝi prezentas la katalunan esperantistan junularon, sed ankaŭ la katalunan movadon ĝenerale, kaj entute esperanton. Iom post iom ĝi riĉiĝos per pliaj kaj pliaj dokumentoj, kaj fariĝos utiliga biblioteko por interesitoj kaj aktivuloj. Novaĵoj estas ankaŭ bone reliefigitaj, kio donas al la TTT-ejo senton de aktualeco kaj vivanteco.

Plenvelas la KEJ-listo

Kiel anoncote en nia pasinta numero, la ret-listo de KEJ ekfunkciis komence de marto, tuj post la renkontiĝo en Mataró. Post duonjara funkciado, ĝi jam kunigas 42 retulojn, kaj montriĝis utiliga ilo por la organiziĝo de la junaj katalunaj esperantistoj. Pri ĝia vigeleco atestas 142 mesaĝoj senditaj de 17 membroj dum septembro. La liston mastumas Xavi Batlle, el Sabadell, kaj eblas aliĝi al ĝi el la ret-paĝo www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej.



KEJ-anoj asembleas

Nova domajno .cat

La ret-domajno .cat estis oficiale akceptita de la Internacia Organizo por Asignitaj de Nomoj kaj Nombroj la 15an de septembro. Temas pri sufikso evidentigonta, ke la enhavo de la TTT-ejo rilatas al la “kataluna lingva kaj kultura komunumo”, kio por la unua fojo estis akceptita por senŝtata nacio. La peton subtenis 68 000 individuoj kaj pli ol 800 asocioj konsulteblaj en la retejo www.puntcat.org. KEA estis unu el la aliĝintoj, kaj planas ŝanĝi siajn ret-adresojn esperanto-ct.org al esperanto.cat, kiam la nova domajno ekfunkcios, fine de la kuranta jaro.

*Nova KEJ-logotipo.
La renovigo de KEJ montriĝas ankaŭ
en la nova asocia emblemo,
dezajnita de Guillem Sevilla.*



Nova kurso en Premià de Mar

Kiel pasintjare en Mataró, komenciĝos ĉi-oktobre kurso de esperanto en Premià de Mar, organizita de la loka grupo de la sindikato CNT kun la subteno de KEA. La antaŭenpaŝo dankindas al la aktivuloj de CNT en Mataró, kiuj en majo tre pozitive diskonigis sian pasintjaran sperton kaj fruktodonan kunlaboron kun KEA al ĉiuj aliaj grupoj de la sindikato en Katalunio. Ĉi-jare denove okazos kurso en Mataró, prizorgita de kelkaj ekslernantoj, sukcesintaj bonege posedi la lingvon.

Joventut Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Junularo
www.esperanto-ct.org/kej

Jam tri Indymedia-projektoj uzas esperanton

Kion signifas 'informi'?

Spektante televidon, vi vidas homojn, kiuj parolas rekte al vi kaj rakontas multajn okazaĵojn de la mondo aŭ de via regiono, sed vi ne povas respondi al ili, vi ne povas publike opinii. Kiam vi aŭskultas radioprogramon, ĵurnalisto rakontas novaĵojn al vi, sed vi ne povas diri publike vian propran opinion. Legante novaĵojn en ĵurnalo, vi povas kredi, ĉu tiuj novaĵoj estas veraj aŭ ne, sed vi ne povas skribi publike vian opinion en tiu ĵurnalo. Do, de la komenco de la ĵurnalismo, jaron post jaro, ni alkitimiĝis al la sistemo "unu homo informas kaj alia nur legas", kaj oni pensas, ke tio estas la plej bona sistemo por informi al la mondo pri la mondo. Tio estas nur "fermita informo". Partoprenas nur unu flanko.

Indymedia kreis alian sistemon. Indymedia, helpe de interreto, kreis sistemon por libera informado. Kion tio signifas? En Indymedia ĉiu homo povas publikigi siajn novaĵojn, tekstojn, fotojn aŭ videojn... sed ankaŭ aliaj homoj povas respondi al tiuj novaĵoj. Tio estas "malfermita informo". Ambaŭ flankoj aktive partoprenas.

Kio estas Indymedia?

Sendependa Centro de Amas-komunikiloj (SCA) estas internacia reto de sende-

pendaj produktantoj de novaĵoj, kiuj zorgas kaj estas engaĝitaj pri la konstruado de socio libera, egaleca kaj respektanta la naturon.

Ĝi estis kreita origine en Seatlo kiel alternativa rimedo por raportoj pri la eventoj fiaskigintaj la t.n. Kunsidon de la Jarmilo de la Monda Organizaĵo pri Komerco en novembro 1999. La ideo konsistis en retpaĝo, kiu ricevados kaj konservos videojn, son-dosierojn, bildojn kaj tekstojn, kiujn povus publikigi kaj reprodukti sen kopirajtoj iu ajn homo aŭ amas-komunikilo sen komerca profitcelo. Nuntempe, ekzistas tri SCA uzantaj esperanton: Brazilo, Barcelono kaj nun Belorusio.

Nun, ni bonvenigas la belorusan Indymedia

Antaŭ kvar monatoj, belorusiaj volontuloj ekis la projekton de SCA Belorusio por divastigi la "liberan informadon" en



sia lando. Ili uzas kvin lingvojn: belorusan, esperanton, anglan, rusan kaj ukrainan, sed la belorusa estas la ĉefa lingvo de la projekto. Post du-tri semajnoj, la projekto plene oficialiĝos en la mondreto Indymedia.

Kiel eblas kunlabori?

Eblas partopreni per diversaj manieroj, depende de viaj kapablo kaj disponebla tempo. Vi povas esti nur eventuala kontribuanto, publikigante de tempo al tempo artikolojn en la hejma-paĝo. Se vi ŝatas skribi kaj volas fari esploraŭ inform-raportojn pri eventoj, vi povas partopreni la kolektivojn pri eldona politiko kaj disvastigo. Vi povas ankaŭ helpi per periodaj tradukadoj de naciaj lingvoj al esperanto, ekzemple.

Joan Català

(Volontuloj de la barcelona SCA kore brakumas la samideanojn de la belorusa SCA: "la informo estos libera, aŭ ne estos informo".)

Indymedia-projektoj uzantaj esperanton:

- SCA Brazilo: brazil.indymedia.org
- SCA Barcelono: barcelona.indymedia.org
- SCA Belorusio: belarus.indymedia.ru

Fariĝu subtenanta membro de KEA

Subtenantoj minimume kotizas duoble,
kaj dank'al ili ni povas pli glate daŭrigi nian agadon

skribu al: kea@esperanto-ct.org

Laboraĵoj pri esperanto

La lasta eduk-reformo enkondukis, ke mezlernejoj en siaj du lastaj jaroj devos verki t.n. esploralaboraĵon. La lernanto devas esplori temon dum pluraj monatoj, kaj i.a. pruvi ĝian kapablon strukturi kompleksan datumaron kaj serĉi en bibliotekoj. Ĉiujare ni ekscias pri du-tri junuloj okupiĝantaj pri esperanto, kiujn KEA helpas orientiĝi kaj malfermas sian bibliotekon en Sabadell. Sendube, la plej interesa ĝisnuna esploro estis tiu de Ricard Guasch pri la historio de la esperanto-movado en Gran Penedès. Ĉi-jare kvin homoj komencis siajn esploralaborojn, kio estas malgranda sed rekorda nombro, kaj kelkaj partoprenis la Esperanto-Tagojn en Barcelono, kies strukturo montriĝas ideala por ili. La fakto, ke tri el ili estas el Maresme kredeble ŝuldiĝas al la granda agado en Mataró dum la pasinta lernoĵaro.

Resumo en esperanto

La TTT-ejo de la ekologia kurier-kooperativo Trèvol (www.trevol.com) havas mallongan resumon pri la agado de la entrepreno en pluraj lingvoj – hispana, franca kaj angla –, al kiuj aldoniĝis esperanto.

Vilaĝfestaj paroladoj

Eble por la unua fojo esperantisto estis honorigita fari malferman paroladon en vilaĝfesto. Tio okazis en septembro, sed ne al unu homo, sed eĉ al du. Josep Franquesa, KEA-prezidanto, prelegis la 15an en sia naskiĝvilaĝo, Sant Feliu de Codines, dum Bàrbara Suau, aktivulino de Majorka Esperantistaro, paroladis en Bunyola, sia vilaĝo, la 17an. Suau interesege ligis la vilaĝ-festojn kun la cetera popola heredaĵo, dum Franquesa prezentis esperanton samtempe kiel mond-transforman utopion kaj kiel praktikan rimedon.

Literatura revuo pri Devi kaj Seabra

La literatura revuo *Els Marges* (numero 76, printempo 2005), publikigis 26-paĝan artikolon de prof. Víctor Martínez Gil titolitan “Leteroj de Salvador Espriu al Vimala Devi

kaj Manuel de Seabra”. En ĝi eblas i.a. legi pri la procezo de traduko de la fama poemlibro “La Taurofelo” de Espriu al la portugala kaj esperanto. La esperanto-traduko restas neeldonita.

Monato pri Andoro

La septembra numero de la magazino *Monato* surprizis pro sensacia novaĵo frontpaĝa: “Andoro ne estas Monako”. La geografian malkovron ni ŝuldas al nia samasocio, la topografo Gerard Escuer, kiu artikolas pri la lastaj parlamentaj balotoj en la pirenea princplando.

“Esperantistoj ne konas la realon”

Kiel Gerard Escuer, ankaŭ Hektor Alos trafis sensacieman redaktoron de revuo. Lia artikolo, kie li esprimas ioman elreviĝon pri esperantistoj kiel efektivaj defendantoj de lingva diverseco, aperis la 20an de septembro en la reta revuo *Libera Folio* sub la titolo “Esperantistoj ne konas la realon”. Ĝi vekis kelke da polemiko en la revuo.

IKEL-estranano

Hektor Alos estis elektita estrarano de la Internacia Komitato de Etnaj Liberecoj dum la pasinta Universala Kongreso en Vilno. Katalunoj havas longan tradician rilaton kun tiu organizaĵo, fondita en Barcelono. Nuntempe ĝia revuo, *Etnismo*, vige redaktita de Nicole Margot, estas presata en Katalunio, zorge de Llibert Puig, ankaŭ plurjare estrarano de IKEL.



Bàrbara Suau prelegas



Lluís Batlle, prezidanto de KEJ, kaj Onjo Ĉerņiŝova, rusa esperanto-aktivulino, geedziĝis en Moskvo la 7an de septembro.



Josep Franquesa kaj Mundeta Gòdia partoprenis la 4an Azian Kongreson en Katmando.

Omaĝo al murditoj

Dimanĉon la 18an de aprilo en Bunyola, estis omaĝitaj la respublikanoj murditaj en la komenco de la interna milito, kaj entombigitaj en komuna foso. Pli frue la omaĝantoj partoprenis gviditan promenadon tra la lokoj, kie okazis signifaj okazaĵoj dum la respubliko kaj la milito. Unu el ili estis la



Foto: Xim Valdivielso

domo, kie oni gardas la afiŝon anoncitan en *Kataluna Esperantisto* n-ro 328, kie aperas pluraj tiutempaj flagoj, inter ili la esperanta, kion la gvidanto substrekis.

xm

Germana esperantisto ĉe ni


Elisabeth Laika, bavara studento pri matematiko, ekloĝis en Bellaterra por sekvi studsemestron en la tiea universitato. Ŝi rapide integriĝis en la lokan esperanto-movadon, partoprenante en la barakoj de Sabadell kaj la renkontiĝo de Barcelono.

CNT agas esperante

Aktivuloj de la sindikato CNT amasiĝis la 13an de aŭgusto antaŭ vendejo de la ĉeno Mercadona en la turisma Calella de la Costa, por montri sian solidarecon kun maldungitaj laboristoj. Dum la agado, la sindikatanoj elmontris tol-afiŝon en la angla, germana, franca kaj esperanto por ne lasi indiferentaj la turistojn.

cnt maresme

De Jorge Camacho, plurfoje akaparinta la premiojn de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj unu el la plej interesaj kaj intensaj esperanto-verkistoj nuntempaj, eldoniĝis pasintjare ĉe Bero du elstaraj poemaroj: Celakantoj kaj Saturno. La unua kunigas lian ĝistiaman poezian verkaron, dum en la dua aperas duvizaĝe – unu fronte al la alia – la samaj poemoj esperante kaj hispane, kio kaŭzas grandan ĝuon al la regantoj de ambaŭ lingvoj. Lastatempe li verkas multajn mallongajn poemojn en japana stilo, la plimulton eldonatan de la literatura gazeto Fonto. Ni prezentas du el ili ligitajn al ĵusa okazaĵo.



“Maljapanesko”

Post uragano audiĝas dise pafoj:
Nov-Orleano.

Madrido-Bruselo, 5.9.2005

“Papilia efiko”

Nov-orleanajn malordon kaj mallumon
ne papilio
— helikopter' inspiris
en Mezopotamio.

Strasburgo-Madrido, 8-9.9.2005

“Ni bezonas dizelon”

Ni demandis kelkajn junajn aktivulojn pri la nuna situacio de la junulara esperantomovado ĉe ni, kaj iliaj perspektivoj por estonteco. Jen la respondoj de Joan Català, Lluís Batlle, Carles Verdugo, Roger Prieto, Guillem Sevilla kaj Pau Climent.

Kiuj estas la celoj kaj planoj de KEJ por estonteco?

JOAN: Ni ne multe kune cerbumis. Mankas pli da kunvenoj inter ni, mankas komunaj ideoj, komuna prioritato de la ideoj, ni ĉiuj devas reaktivigi nian movadon: KEJ/VEJ helpatajn de KEA. Kutime, multaj esperantistoj volas fari aferojn, sed ili atendas, ili ne agas. Mia plej ŝatata frazo estas “Ne intencu, agu!”.

LLUÍS: Ne estas nun aŭ komuna celo aŭ komuna agado. Ĉiu havas sian rilaton al la lando, en la senco, ke ĉiu sentas sin landano, esperantisto, kaj ne malpli grave, ankaŭ amiko de la aliaj katalunaj esperantistoj. En la esperantistaro kataluna ĉiu homo havas ian individuan celon. Multaj estas lingvemaj, aliaj – revoluciemaj, aliaj – vojaĝemaj kaj festemaj. Ĉiu certe havas po iom ĉiun econ diritan; tamen, diversgrade. Tiu diversseco malhelpis iom la komunan agadon. Oni ne komprenu, ke mi taksus pli bona alian situacion (*rideto*).

CARLES: En la organiza flanko oni ankoraŭ bezonas multe paŝi, sed ni havas grandan avantaĝon: pli kaj pli aperas homoj kun novaj vidpunktoj, novaj fortoj kaj emoj.

ROGER: Mi ne vidas, kial devus esti komuna agad-linio: multaj flankoj povas eĉ helpi.

GUILLEM: Kiel Lluís kaj Joan jam diris, konstatindas ke ni havas neniajn konkretajn planojn por estonteco. Kiel Joan, mi pensas, ke estas tute necesa kuna cerbumado por decidi komunan agadon. Tiun komunan kaj kunordigitan agadon mi taksas nepre por plej efike utiligi kaj ĉiujn niajn unuopajn fortojn kaj nian forton kiel Asocio. Tamen, ni estas survoje: ni sufiĉe aktivis lastatempe, ni preskaŭ finis nian TTT-ejon kaj aliajn aferojn, kiujn ni certe bezonas. Ŝajne ni antaŭeniras iom po iom.

PAU: Mi pensas, ke ĉiu ideo estas bonevena, kaj ke ni devas “tuŝi la plankon per la piedoj”. Ni devas ankaŭ zorgi pri mono, ĉar per ĝi ni povos vidigi nin pli multe. Vidigado de KEJ/VEJ estas tre zorginda afero. Sed ne nur tio: ni devas agi, kaj agi ĉie en nia “agadejo” (aŭ “agadujo”).

Kiel progresu nia afero?

JOAN: Mia unua celo en la kataluna esperanta movado estas la divastigo de esperanto per T-ĉemizoj, afiŝoj, TTT-paĝoj, kalendaroj ktp... La propagando estas tre bezonata, kaj ni devas multe labori pri tiuj aferoj.

LLUÍS: Do, mi estas aktiva en la traduko de komputila programaro, kaj en la kreado de rimedoj por esperantistoj ĝenerale. Miaj nunaj intereso ne movas min al agado por katalunoj konkrete. Ekzemple, estu rimedoj por lerni aliajn lingvojn. Estu rimedoj por ne dependi ĉie de la angla. Estu taŭgaj terminoj por la medioj, kie ĉefe uzatas la angla. Tamen mia ĉefa kampo por la esperantismo estas la komputila, ne speciale kataluneca. Ekzemple, mi ĝojis kiam hodiaŭ amiko diris al mi, ke li volus esperantan tradukon de *PHPMyAdmin*: tian taskon mi volonte aldonas al mia listo de farendaĵoj por esperanto.

CARLES: Mi kredas je la kunagado kun aliaj asocioj, kolektivoj, sindikatoj ktp... Esperantismo funkcios nur tiel.

ROGER: Mi sentas bezonon de internaciaj renkontiĝoj. Sed ankaŭ la barakoj de Sabadell estas bona ideo por varbi homojn. Necesas kunveni, kaj analizi, kio okazis por ne perdi monon denove. Sed ni devas esti singardemaj, ĉar manko de rezultoj povas mortigi la movadon.

GUILLEM: Kiel Roger konsilas, estas grave konscii pri niaj monaj (kaj homaj – mi

“Necesas kuna cerbumado por decidi komunan agadon”

“Ni agu kun aliaj asocioj, kolektivoj, sindikatoj”



Joan Català

“La sola bezonata afero estas kunordigi niajn celojn”

“Estu rimedoj por ne dependi ĉie de la angla”



Lluís Batlle

aldonas) fortoj por agadi realisme kaj efektive. Cetere, mi konsentas pri la respondo de Carles. Esperanton ni devas igi socia kaj ne (nur) asocia. Tiel kompreneble ni devas direkti kelkajn el niaj fortoj al la enkonduko de la internacia lingvo en sindikatojn, politikajn partiojn, asociojn k.a. Kompreneble, ni devas nin direkti al organizaĵoj havantaj similajn vidpunktojn al la nia. Plie, mi volas substreki tion jam diritan de Lluís: “estu rimedoj por ne dependi ĉie de la angla”. Ni kreu rimedojn por lerni lingvojn per esperanto, kaj ni subtenu iniciatojn montrantaj la utilecon de esperanto por komuniki internacie (kiel *Indymedia* aŭ similajn). Por kreski certe necesas propagando, kiel diras Joan. Tamen, notindas, ke foje estas preferinde diri nenion al diri multon fuŝe. Gravas montri kvalitajn kaj bonaspektajn propagandilojn. Por atingi tion, gravas, ke ni laboru kunordigate. Nur tiel ni povos kreskigi kaj fortigi la asocion.

PAU: Ni devus zorgi pri: 1) esti realistaj; 2) estas ĉie multaj homoj, kiuj certe interesiĝus pri esperanto, se estus babilado en ilia urbo, do ni profitu tion: ni babilu, ni faru rondajn tablojn kaj ion ajn similan; kaj 3) Ni festu, jes, ni festu, ni “ŝajnigu nin la plej bonegaj, ĉar ni parolas esperanton”, ni kreu la interesiĝon (aŭ la bezonon) pri esperanto... sed por festi ni bezonas monon, bedaŭrinde, do ni cerbumu pri ideoj por akiri ĝin.

Kiaj iloj mankas laŭ vi? Kaj kiajn el ili povus prizorgi KEJ?

JOAN: Iloj ne mankas, ni havas bonajn komputilistojn, kiuj bone scipovas programi retpaĝojn, dezajni afiŝojn, redakti artikolojn; ni havas disendolistojn, ni havas *Katalunan Esperantiston* regule ktp... la sola bezonata afero estas kunordigi niajn celojn.

LLUÍS: Certe por ĉies komunikado, indas rimedoj por la novaj lernantoj. Ĉefe retaj. Kelkaj pretigas paĝaron pri novaĵoj, kelkaj tradukadas aferojn esperanten por la eston-



Carles Verdugo

taj esperantistoj, kelkaj pretigas kursojn por katalunlingvanoj ktp.

CARLES: Mi kredas je la divastigo de esperanto vizaĝ-antaŭ-vizaĝe, do mi proponas agi en la stratoj, en sindikatoj... fari pli da esperanto-kursoj.

ROGER: Ni havu pretajn aferojn por homoj, kiuj volas lerni, sed ni ne devas persekuti illin. Tamen laŭ mi ne ĉefe mankas iloj, sed mono, por malkostigi aranĝojn, ĉefe por eksterlandanoj.

GUILLEM: Mi bezonas pensi plu pri tiu demando...

PAU: Mankas al ni “Eurosúper 95” aŭ dizelo! (*Li ridas*) Ni bezonas, ke homoj el Katalunio venu Valenciolanden, kaj inverse, kaj ni kune iru insulen (al Majoriko ktp). Mi pensas pri disvastigado. Mi persone pensas, ke tiuj flug-folietoj de Guillem estas... simple bonegaj! Oni devas sin vidigi, agi... Tio kostos iom da mono, sed mi pensas, ke tio taŭgas.

Ĉu vi havas precizan kaj simplan proponon?

JOAN: Ni devus renkontiĝi dum semajfino en ĉiu 4a-6a monato por babili, diskuti, bierumi... anstataŭ nur kontakti rete. Tio donus multajn fruktojn al KEJ/VEJ.

LLUÍS: Estu renkontiĝoj oftaj! (*Serce:*) Kvazaŭ ni estus sekto! Tiel ni pli konos nin, por trovi komunajn interesojn, kiuj puŝetos nin al komuna agado por tiu komuna intereso

CARLES: Uzu esperanton ĉiutage hejme, en la lernejo, dum laboro, trajne, surstrate, en la sindikato... tiamaniere, aliaj homoj vidos ĝin normale kaj povos interesiĝi rapide.

ROGER: Mi konsentas kun Joan: estas tre bona solvo pli da renkontiĝoj inter ni dum



Roger Prieto



Guillem Sevilla



Pau Climent

somero, printempo, aŭtuno kaj vintro. Sed renkontiĝoj ne estu kiel la lasta en Barcelono, sed eble kiel la pasinta en la trinkejo “Pata Palo”... Mi preferas ne tre seriozajn renkontiĝojn.

GUILLEM: Ni petu permeson por traduki esperanten TTT-ejojn vizitatajn de uloj eble interesitaj je niaj proponoj, ekz.: www.free-catalonia.com. Pri la aserto de Carles: nu, se iu vere uzas ĝin ĉie kaj ĉiam, tiu eble estos vidata kiel *frikulo*.

PAU: Ni kreu “klubojn”, kie lokaj esperantistoj renkontiĝu. Tio en Barcelono facilas, sed oni devus same agi Valencilande kaj ĉie en nia landaro. Ni parolu ankaŭ kun Acció Cultural del País Valencià kaj kun la universitatoj, por ke ili pruntedonu al ni ejojn por paroli pri esperanto, festumi esperante ktp.

Vi ĉefe sentas mankon de renkontiĝoj. Ĉu vi ŝatus organizi regulan internacian renkontiĝon ĉiujare? Ĉu en Katalunio, ĉu iberie?

JOAN: Mi neniam organizis internacian renkontiĝon, sed ŝajnas multe da laboro. Mi ne scias, ĉu tio eblas nuntempe. Mi preferus organizi internacian renkontiĝon, sed kune kun KEA. “Pensu monde, agu loke”, jen mia filozofio.

LLUÍS: Mi tre ĝuas en la katalunaj renkontiĝoj, ĉar estas tre bonaj amikoj. Kaj kun la portugaloj kaj hispanoj mi havas preskaŭ nur komputilecan rilaton. Krom la katalunoj, la cetero de miaj amikoj esperantistaj estas sufiĉe diverslandaj. Mi ne sentas specialan rilaton kun la iberianoj por ial deziri iberian renkontiĝon. La esperantiĝo forgesigis al mi la landon de miaj amikoj jam. Rilate al preparo de internacia renkontiĝo, mi ne tre ĝue laborus por tion organizi. Mi preferas la organizitajn kongresojn fare de *aliuj*.

CARLES: Mi opinias, ke ne estas entute ia neceso de internacia aranĝo ĉiujara en Katalunio. Internacie, laŭ mi, la aranĝoj devas esti ĉiam en malsamaj lokoj, ĉar alikaze, la aranĝoj fariĝus lokaj, regionaj aŭ por tiuj homoj loĝantaj en najbaraj landoj. Tial, se oni organizus internacian aranĝon, mi preferus, ke ĝi okazu en la kadro de la tuta Iberio.

ROGER: Jes, mi kredas, ke tio indas. IJK eltenas sufiĉe bone, sed IS kaj IJF vere malkreskis kaj eĉ iomete fiaskis. Eble ni povus profiti tion, planante vere grandan kaj seriozan aranĝon, kiun ni organizus ĉiujare. Tio devus okazi ĉiam en malsama urbo, kiel faras germanoj kaj italoj, kaj ĝi povus okazi eĉ ie en Iberio.

GUILLEM: Mi supozas, ke renkontiĝoj gravas (kvankam la nunaj sufiĉe kontentigas min). Mi, kiel Joan, kontentiĝus simple per kunlaborado kun KEA kaj ĉefe en la tuta Kataluna Landaro. Tamen, se ni parolas internacie, eble estus bone ĉeesti en renkontiĝoj de aliaj iberiaj esperanto-organizaĵoj (unue HEF, sed ankaŭ PEA ktp...) kaj subteni la okcitanan movadon. Ja gravas havi bonajn rilatojn kun niaj najbaroj! Kaj, eble, ni povas eĉ proponi komunan “fratan renkontiĝon” de ĉiuj iberiaj asocioj kaj federacioj... Kaj alian katalun-okcitana, kaj alian... de ĉiuj mediteraneaj asocioj! Kial ne?

PAU: Mi preferus, ke renkontiĝoj okazu en la kadro de la Kataluna Landaro. Ni devus “rekonkeri” la sudon, ĉi-foje vere re-. Ni agu en Valencilando, almenaŭ en Castelló! Mi tre ŝatus, ke oni renkontiĝu en Xàtiva aŭ en Alcoi, aŭ... ie ajn en Valencilando! Mi scias, ke valenciaj membroj de KEJ/VEJ/KEA malmultas, sed tio kreskigus la aferon sude. Ni montru nin kiel “ni estas la plej bonegaj, kaj ni organizas neforgeseblajn diboĉojn” kaj tio alportus multajn homojn! (*Li ridas*) Sed temas ne nur pri bierumado, sed ankaŭ pri aranĝoj, babiladoj, rondaj tabloj, ie ajn en la Kataluna Landaro. Eble Valencilande indus prezenti nin kiel Valencian Esperanto-Junularon, sen kaŝi nian kunlaboron kun KEJ/KEA.

“Ni planu vere grandan kaj seriozan aranĝon”

“Ni kreskigu la aferon en Valencilando”

MAS, la Monda Asembleo Socia, ĝus fondiĝis

La 2an de aŭgusto, post kvinmonata reta diskutado, interkonsentiĝo kaj fina aprobo de sia fundamento (statuto, Oftaj Demandoj kaj regularo pri aliĝoj), MAS, la Monda Asembleo Socia, oficiale fondiĝis – oficiale, ĉar MAS laboris jam dum sia fondoperiodo. Jen cetero sufiĉe unika maniero fondi asocion – kaj ankaŭ sufiĉe interesa, ĉar ĝi ebligis senurĝe kaj ĝisfunde pridiskuti la fundamenton de la asocio kaj interkonsentiĝi pri ĝi – ĝi estis fakte la unua paŝo de nova vojo de memorganiziĝo de asocio, kies ecoj estas same novaj.

Kio estas MAS?

La tutmonda organizo de ĉiuj homoj, kiuj ne nur konvinkiĝis, ke pli bona mondo eblas, sed kiuj pretas kune diskuti kaj agi por realigi ĝin.

Ili agas por la monda paco, defendas la interesojn de la tuta homaro kaj klopodas por evoluigi – komencante ĉe si mem – eksternacian pens- kaj ag-manieron home solidaran. Ili strebas kontribui al starigo de mondvasse senklasa socio sen ekspluatado, socio kiu respektas la dignon de siaj membroj sen distingo de aĝo, haŭtkoloro, sekso, seksa orientiĝo, etna aŭ nacia aparteno kaj kredo – socio, kiu organizas sian ekonomion laŭ la bezonoj de ĉiuj siaj membroj, protektante la planedon Tero por estontaj generacioj.

MAS estas permanenta Monda Asembleo. Ĝi laboras ekskluzive per retpoŝto, ne postulas membrokotizon, estas sen piramidecaj strukturoj – ne havas estraron, nek prezidanton, nek konfliktkomisionon ktp, do, ĉiuj membroj decidas rekte mem, laŭ la principoj de rekta (aŭ baza) demokratio, kaj ĝi estas perfekte “travidebla” – do, nenia diskuto, decido aŭ faro estas kaŝita al iu membro.

Ĉiu membro rajtas reprezenti la asocion surbaze de ĝiaj statuto kaj decidoj.

Rigardu en ĝian retpaĝon:

mas-eo.org

Tie vi trovas ne nur informojn pri MAS mem, sed ankaŭ interesajn artikolojn pri aktualaj sociaj kaj politikaj demandoj.

MAS vokas vin

Homoj, kiuj ŝatus kunlabori en la bazdemokratia asocio MAS, kaj pensas, ke ili havas la saman celon kiel ni, kaj tial volas fortigi nian asocion per siaj ideoj kaj agadoj, estos al ni tre bonvenaj. Ni ne povas havi tro da memkonsciaj membroj, kiuj kun ni volas elprovi novan vojon de emorganizado de esperanta asocio.

MAS estas neniel konkurenco por aliaj organizoj, ne povas esti io tia, ĉar la

celoj de MAS ne estas grup-egoismaj. MAS estas malferma por ĉia laŭstatuta kunlaboro, kaj laŭ la statuto eĉ estas devigata al tio. Ni bezonas ĉiun, kiu subtenas niajn celojn. Samtempa agado de niaj membroj en aliaj organizoj por ni ne estas malhelpo, sed riĉigo.

Ni estas konsciaj pri tio, ke nia statuta celo estas afero, kiu bezonas longan spiron. Monda socio sen klasoj, sen militoj, kaj kun laŭhomara ekonomio estas granda celo, kompreneble ne atingebla post tri jaroj. Per ĝia fondo kaj eklaborado ni metis nun la fundamenton por organizo, en kiu la individuo denove povas esperi ne esti la ludilo por aliaj. Ĉe MAS neniu havas “la potencon” kaj neniu havos ĝin, ĉar laŭ laŭ ĝia strukturo – fiksita en la statuto – tio ne eblas. Tial ĉiu, kiu volas ne esti ŝafo por iu alia, ne havas kialon por maltrankviliĝi aliĝante al MAS – ni volas elprovi novspecan organizon, kiu estas vivtenata ne per burokrata maŝino, sed rekte de la membroj mem.

Por ke ĉiu kaj precipe ankaŭ malriĉuloj povu partopreni, ni postulas neniun membrokotizon. Sed ni akceptas monodonacojn, de tiu, kiu povas helpi nin per mono. Ni uzu do la okazon de tiu nova memorganizado de esperantistoj. Se vi estas esperantisto, kiu havas ideojn kaj energion kaj sencon por justeco, se vi estas optimisto kaj pensas, ke vi havas ion por diri, nepre aliĝu al MAS. MAS vokas vin!

L'Associació Catalana d'Esperanto només es manté amb les vostres aportacions



Fes-te'n soci

